

Eŭropa Bulteno

Marto 2014, Numero 136

LA KROATIA ŜTATPREZIDANTO JOSIPOVIĆ SUBTENAS ESPERANTON

La 25-an de marto la aŭspicianto de Eŭropa E-kongreso, ŝtata prezidanto de Respubliko Kroatio, d-ro Ivo Josipović, sendis al EEU mesaĝon por la kongreso en Rijeka, en kiu li interalie asertas ke li persone subtenas Esperanton (vidu la suban kompletan mesaĝon). Sed okazis plia surprizo: Li invitis al akcepto en lia prezidantejo en Zagrebo unu monaton antaŭ la kongreso delegitaron de EEU por interparoli pri la kongreso kaj Esperanto. La estraro de EEU invitis lin ankaŭ veni persone al la malfermo de la kongreso, pri kio ni atendas lian respondon.

Jen plia kaŭzo por ke venu al la kongreso laŭeble multaj eŭropaj esperantistoj.

Se vi interesiĝas pri Ivo Josipović, kiu profesie estas juristo kaj muzika komponisto, universitata profesoro kaj politikisto, vi povas legi lian biografion en WikiTrans:

http://epo.wikitrans.net/Ivo_Josipovi%C4%87?src=Ivo+Josipovi%C4%87

MESAĜO DE IVO JOSIPOVIĆ AL EEU-KONGRESO EN RIJEKA



Estimataj organizantoj de la 10-a kongreso de EEU, karaj gastigantoj, estimataj partoprenantoj kaj eksterlandaj gastoj!

Estas granda plezuro por mi deziri al vi koran bonvenecon en Kroatio kaj Rijeka, urbo konata pro sia malfermiteco kaj multkultureco.

Kvankam Kroatio nur en la pasinta jaro aliĝis al Eŭropa Esperanto-Unio, tradicio de lernado de Esperanto, lingvo kiu kunligas popolojn kaj naciojn de ĉiuj koloroj, kredoj, lingvoj kaj rasoj estas preskaŭ same longa kiel en aliaj eŭropaj landoj. Tio ne mirigas, ĉar ja en sia 127-jara historio ĝi iĝis grava parto de nia komuna eŭropa kultura heredaĵo. De la ekesto en la jam fora 1887-a jaro ĝis hodiaŭ Esperanto notas riĉan kaj per eventoj ŝtorman pasintecon dum kiu periodo kreskis la nombro de la parolantoj en ĉiuj landoj de la mondo. Ne estas dubo ke ankaŭ estonte Esperanto kontribuos al plifortigo de

eŭropa identeco kiu apogiĝas al nacia identeco de ĉiu lando kaj helpas al pli rapida lernado de fremdlingvoj kaj al pli facila reciproka interkonatiĝado.

La esperantista movado ekviglis en Kroatio komence de la 20-a jarcento kaj la tradicio pri kiu ni prave fieras seninterrompe daŭras ĝis la nunaj tagoj. Kroatoj estis aktivaj sur ĉiuj kampoj de poresperanta aktivado – de literatura ĝis eduka, promociante la nacian literaturon per Esperanto en foraj mondaj landoj, sed ankaŭ igante Kroation konata pro unu el la plej sukcesaj instrumentoj: La Zagreba Metodo. Ĉi-loke mi devas menciigi ankaŭ profesoron Ivo Lapenna el Split kiu dum 20 jaroj sukcese gvidis mondan esperanto-organizaĵon UEA.

Ĉar mi persone subtenas la ideon de Esperanto: la disvastigon de internacia paco kaj amikeco, kiu devas havi sian bazon en egalrajteco de ĉiuj popoloj, mi kun ĝojo akceptis aŭspicii la 10-an jubilean kongreson de Europa Esperanto-Unio. La titolo de la ĉeftemo pri kiu vi okupiĝos ĉi-jare „Justa Eŭropo kaj justaj lingvaj rilatoj – malmultekosta komunikado“ estas ankaŭ proksima al bazaj postuloj de mia prezidanta programo kiu promocias justecon je ĉiuj niveloj. Esperante ke per la diskutoj, prelegoj kaj neformalaj amikiĝadoj vi atingos konstruajn konkludojn, mi deziras al vi sukcesan kaj fruktodonan laboron kaj agrablan restadon en Rijeka.

Mi kredas ke tiu ĉi kongreso estos stimulo al multaj el vi por reviziti nin.

Kore,

Zagrebo, la 25-an de marto 2014

Prezidanto de Respubliko Kroatio

Ivo Josipović

PLILONGIGITA RABATITA ALIĜADO AL LA KONGRESO

Baze de la decido de la estraro de EEU la rabatita kotizo por aliĝi al la Deka kongreso en Rijeka valida ĝis la fino de marto estas plilongigita ĝis la fino de aprilo. La estraro faris tiun decidon volante stimuli tiujn eŭropanojn kiuj ĝis nun hezitas pri tio ĉu veni aŭ ne, konsiderante la plej novan evoluon rilate la gravecon de la kongreso. Ni ŝatus ke dum la kongreso, kiun eventuale vizitos la ŝtatprezidanto mem ĉeestu pli da kongresanoj.

Ĉiujn kiuj havas eblecon, ni petas disvastigi tiujn ĉi informojn.

Informoj pri la kongreso: <http://eeu-kongreso.webnode.com//>

kaj pri la antaŭkongreso: <http://eeu-kongreso.webnode.com/anta%C5%AD-kaj-postkongresoj/>

Zlatko Tišljarić



LA CIVITANA SOCIA PLATFORMO DE EU POR MULTLINGVISMO PLENKUNSIDIS EN BRUSELO

La Eŭropa Komisiono (EK) organizis en Bruselo la 14-an de marto 2014 plenkunsidon de la Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo (CSPM), kiu funkcias ekde 2009 kaj en kiu aktivis 29 neregistaraj civitanaj organizoj. Inter ili aktive laboras la Eŭropa Esperanto Unio (EEU) kaj la civitana organizo Edukado@Interreto (E@I). La plenkunsidon partoprenis ankaŭ kvar esperantistoj: Seán Ó Riain kaj Jozef Reinwart nome de EEU kaj Peter Baláž kun Maja Tišljár reprezentis E@I. Estis bedaŭrinde, ke la plenkunsidon ne povis partopreni plia esperantisto Nico Huurman de AEGEE, kiu estas ankaŭ membro de CSPM.



Uwe Mohr, prezidanto de CSPM, kiu forlasas la postenon de la prezidanto, taksis la 5-jaran funkciadon de la CSPM. Li akcentis ĝian ĉefan rezulton - raporton kaj rekomendojn, kiuj prezentas "voĉon de civitanoj" kaj estis prezentita al EK en junio 2011. Li kun bedaŭro konstatis, ke EK ne utiligis ĝis nun ĝian novigan potencialon kaj lasis ĝin nur en la angla en paĝaro de EK kaj ne dissendis ĝin al EU-aj membro-ŝtatoj.

Anna Carla Pereira, direktorino de la Departemento por Instruado, Lertecoj, Kvalifikoj kaj Multlingvismo de la Ĝenerala Direktorarejo por Edukado kaj Kulturo de EK, emfazis la gravecon de CSPM-rekomendoj kaj aktivan partoprenon de 29 eŭropaj civitanaj organizoj, kiuj membras en CSPM. Ŝi aprezis la raporton kaj rekomendojn kaj bedaŭris, ke intertempe okazis ŝanĝo de la organiza strukturo en EK kaj aliro por antaŭenigo de multlingvismo kaj plibonigo de lingvaj kompetentoj de civitanoj, kio kaŭzis, ke la raporto kaj rekomendoj ne estis dissenditaj al EU membro-ŝtatoj. Ŝi informis pri aktualaj iniciatoj de EK "Malfermita Edukado", "Eŭropo - areo por kapabloj kaj kvalifikoj" kaj "Interŝanĝo de lingvo-instruistoj inter EU kaj Ĉinio".

Kristina Cunningham, estrino de la Unuo por multlingvismo en EK, informis pri aktualaj aktivecoj de EK por subteno de multlingva politiko en EU "Lingva testado", "Eŭropa Tago de Lingvoj" kaj malfermita metodo de kunordigo en la formo de novaj laborgrupoj kun partopreno de membroj de CSPM en diversaj diskutoj. Ŝi informis pri la programo "Erasmus+" kaj eblecoj por membroj de CSPM prezenti projektojn en ĝiaj tri ĉefaj partoj, en kiuj estas donita emfazo al plibonigo de instruado de fremdaj lingvoj kaj movebleco de civitanoj en la komuna EU labormarketo. Krome ŝi informis pri programo "Kreiva Eŭropo", kies celo estas subteni projektojn de literatura tradukado kaj pri eldono de "Gvidlibro por fakuloj" por prepari altkvalitajn kaj novigajn eŭropajn projektojn. La literatura tradukado rajtas esti el kaj al la 24 oficialaj EU-lingvoj, aŭ el la latina aŭ la helena. **Seán Ó Riain** atentigis ke tio ekskludas du gravajn kategoriojn de literatura tradukado: 1) de lingvoj kiel la

kroata kaj la pola tra Esperanto al la ĉina kaj japana; kaj 2) literatura tradukado inter la neoficialaj lingvoj kiel la bretona, la kimra, la skotgaela, ktp. Li montris, ekzemple, la zamenhofan tradukon de *Hamleto*. Kristina Cunningham informis ankaŭ, ke dum la prezidanteco de Italio en EU (2-a duonjaro de 2014) EK organizos en Florenco la 25-an kaj 26-an de septembro 2014 lingvan konferencon pri la temo "Diversaj teknikoj de instruado de fremdaj lingvoj" por rememorigi "Tagon de Eŭropaj Lingvoj" (la 26-an de septembro), al kiu invitos EK ankaŭ membrojn de CSPM.

Kelkaj membroj de CSPM havis eblecon prezenti siajn aktivecojn. **Prof. Bessie Dendrinis** el la Universitato de Ateno raportis pri plurlingva platformo por komparebla lingvo-testado de 6 lingvoj (EN, FR, DE, ES, IT kaj TR je niveloj A1 ĝis C2) aktuale en la greka, kiun oni ŝatus pligrandigi kaj testi en pluraj lingvoj. **Martin Nuttall**, reprezentanto de la Asocio de Lingva Testado en Eŭropo (ALTE) prezentis aliron de ALTE al kreo de kvalitaj normoj por la internacia lingvo-testado. **Jan Roukens** de la Eŭropa Asocio por Terminologio emfazis bezonon subteni kaj plifortigi lingvan diversecon en EU. Plurlingvismo kaj multkultureco de Eŭropo estas granda valoro kaj defio por protekto, uzo kaj evoluo de ĉiuj EU lingvoj en ĉiuj terenoj de la eŭropa komunumo. Por plenumi enhavon de la EU slogano "unuigitaj en diverseco" oni devas superi lingvajn barojn inter civitanoj per elekto de vasta gamo da lingvoj, plifortigo de tradukado, kreo de terminologio kaj konstruo de infrastrukturo (vortaroj, terminologio, teknika helpo). Uzado de lingvoj estas endanĝerigita je ĉiuj niveloj de edukado, en komerco kaj industrio, moderna teknologio, amuzado kaj en aliaj terenoj, ĉar ĉiam pli da universitatoj en ĉiuj EU-landoj instruas en la angla anstataŭ en la nacia lingvo. Tiu emo longe ekzistas en norda Eŭropo kaj li montris per grafika bildo ke tiu emo rapide pligrandiĝas de 2007 ankaŭ en la sudeŭropaj landoj, kiuj tradicie pli vaste uzadis la naciajn lingvojn en supera edukado.



Peter Baláž kaj Maja Tišljár de E@I informis pri novigaj modelaj kaj multlingvaj portaloj por lingvo-instruado de la slovakaj (www.slovak.eu) kaj la germanaj (www.deutsch.info) lingvoj, kiuj estas tre sukcese uzataj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ tutmonde. La komisiono mem petis la prezentojn, konsciente pri la kvalito de la retejoj. Ili prezentis ankaŭ realigadon de multlingva portalo "Lingvo.info" por informado pri lingvoj en EU, kie kunordigan rolon havas EEU kaj E@I estas

partnero de la projekto. Tiuj ĉi kaj pliaj pioniraj interretaj projektoj estis kaj estas financataj de EK. Komence de ambaŭ prelegoj estis klare dirite, ke tiuj ĉi projektoj estas bazitaj je spertoj de la retejo por lerni Esperanton, www.lernu.net, kaj ke lernu.net estis unu el unuaj tiaspecaj retportaloj de la mondo (multlingva, eduka, lingvolerniga, senpaga). **Jozef Reinvar**t de la Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio prezentis tutsocian diskutplatformon en Slovakio "Nacian Konvencion (NK) pri EU", kiu funkcias de 2004, kiu estas ĝis nun la nura tiaspeca diskutplatformo en EU. Li prezentis agadon de renovigita NK pri EU, kiu funkcias de majo 2013 en tri laborgrupoj: 1) Aktualaj defioj de integriĝo, 2) 10

jaroj de membreco de Slovakio en EU, 3) Prezidanteco de Slovakio en EU 2016. Li informis, ke grupo da membroj (kvar esperantistoj) de NK pri EU proponis du temojn "Evoluo de kultura dimensio en EU: komuna lingva kaj kultura politiko de EU" kaj "Uzo de multlingva portalo Slovake.eu dum Prezidanteco de Slovakio en EU 2016". Li alte taksis agadon de CSPM, ĉefe ĝian raporton kaj rekomendojn, kiuj prezentas "voĉon de civitanoj", pri kiuj bedaŭrinde EK ne informis EU membro-ŝtatojn. EK devas ludi aktivan rolon en stimulado de kunlaboro de EU membro-ŝtatoj en plibonigo de protektado kaj evoluado de lingva kaj kultura diverseco en EU kaj pere de tuteŭropa diskuto kun partopreno de politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj serĉi akcepteblajn solvojn por amasigitaj lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU/Eŭropo. Post la kunveno Jozef Reinvarth dissendis pli detalan analizon de la nuntempaj lingvaj problemoj de EU al ĉiuj membroj de la CSPM, kaj klara alvoko al pli celita lingvopolitika agado estonte. Ni atendas la reagojn de la ceteraj membroj de CSPM.

Kristina Cunningham **alte taksis prezentadon de reprezentantoj de E@I** pri novigaj multlingvaj interretaj portaloj kaj projektoj, kiujn finansas EK kaj kiuj estas plej bona ekzemplo por aliaj EU-landoj. Ĝi estas maniero, kiun rekomendas EK, kiel utiligi interreton por plibonigo de lingvo-instruado kaj subteno de vasta multlingvismo. **Slovakio fariĝis modelo por aliaj EU landoj** pere de sia diskutplatformo "Nacia Konvencio pri EU" en antaŭenigo de diskuto pri multlingvismo kaj serĉado de solvoj por lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU/ Eŭropo.

Fine de la plenkunsido okazis voĉdonado por elekti novan prezidanton de CSPM. Estis proponitaj por la posteno kvar kandidatoj, inter kiuj estis ankaŭ **D-ro Seán Ó Riain**, Prezidanto de EEU. Li **estis la sola el la kandidatoj, kiu prezentis sian programon por gvidi CSPM** kaj doni al ĝi novan impulson. Rezulto de la voĉdonado estis etdiferenca. Gajnis ĝin prof. Bessie Dendrinis el la Universitato de Ateno, kiu reprezentas EFNIL en CSPM. Ŝi gajnis nur unu voĉon pli ol Seán Ó Riain. Nico Huurman el AEGEE kaj Heidi Wiley el la Eŭropa Asocio de Teatroj, kiuj ne povis partopreni la plenkunsidon, voĉdonis rete por Seán Ó Riain, kaj tio fakte donus al li plimulton, sed la EK ne kalkulis tiujn 2 voĉojn. Sed Seán Ó Riain kune kun tri aliaj esperantistoj en CSPM sporte akceptis la rezulton de la voĉdonado kaj gratulis al prof. Bessie Dendrinis, nova prezidantino de CSPM, kaj esprimis al ŝi nian plenan subtenon en antaŭenigo de la rolo de CSPM kaj ĝia agado. Por helpi al la nova prezidanto estis formita 5-membra konsilantara grupo, en kiu estas Seán Ó Riain, kies membroj estros temajn laborgrupojn. La nova prezidanto en privataj diskutoj alte taksas novigan laboron kaj altkvalitajn projektojn de E@I, kiel ankaŭ lingvo-politikan agadon en Slovakio enkadre de la Nacia Konvencio pri EU, kio donas al ni esperon, ke nia kunlaboro estos bona kaj alportos pozitivajn rezultojn ne nur por CSPM sed heplos antaŭenigi Esperanton kiel propedeŭtikan rimedon en plibonigo de lingva instruado, por subteno de vasta multlingvismo kaj lingva kaj kultura justeco kaj egalrajteco de ĉiuj civitanoj en EU.

Jozef Reinvarth

PROJEKTO LINGVO.INFO LABORRENKONTIĜO DE PARTNEROJ EN LITOVIO

De la 5-a ĝis la 8-a de marto 2014 okazis en Kaunas en Litovio laborrenkontiĝo de naŭ partneroj en la projekto Lingvo.info. La partneroj el 7 europaj landoj kontrolis la laboron planitan por tiu ĉi periodo kaj interkonsentis pri taskoj farotaj ĝis la fino de la projekto en

novembro ĉi-jare. La celo de la dujara projekto kunfinancata de Eŭropa Komisiono kadre de fonduso pri Tutviva Lernado estas oferti kiel eble plej multajn interesajn informojn pri riĉeco kaj diverseco de eŭropaj kaj neeŭropaj lingvoj kaj tiamaniere instigi homojn lerni novajn lingvojn kaj samtempe ekkoni novajn kulturojn. Ĝis nun la materialoj troviĝas en 17 lingvoj, sed oni planas disponigi ĉiujn informojn en pli ol 20 lingvoj. Kiel rezulto estos ellaborita elektronika paĝaro LINGVO.INFO ĉefe adaptita por scioj kaj kapabloj de junaj uzantoj. Sur la paĝaro estos je dispono ludoj, interaktivaj ekzercoj, kvizoj pri kulturoj de la lingvoj, bazaj lingvistikaj informoj kaj simile, kio ebligas al ĉiuj kiujn fremdaj lingvoj kaj kulturoj interesas, ricevi informojn pri esencaj karakterizoj de la elektita lingvo.

Melita Cimerman

ESTRARKUNSIDO DE EEU EN BRUSELO

La 15-an de marto okazis estrarkunsido de EEU en la loĝejo de la prezidanto en Bruselo. Ĉeestis krom la prezidanto Seán Ó Riain ankaŭ Petro Balaž, Flory Witdoeckt, Maja Tišljar kaj kiel gasto Sandra Schweder. Oni pritraktis kelkajn aktualajn punktojn pri la agado de EEU.

1. Prepare al la asemblea kunsido en Rijeka, kie devos esti elektoj de la nova estraro, la estraro harmonie kun la statuto decidis proponi al la asembleo novan estrarkonsiston pligrandigitan je unu membro: la proponata listo estas: Seán Ó Riain (Irl), Flory Witdoeckt (Be), Nikola Rašić (NI), Zlatko Tišljar (Si/Hr), Petro Balaž (Sk) kaj Sandra Schweder (Be/De)



2. Financa stato de EEU. La vicprezidantino Flory Witdoeckt raportis ke la stato estas kontentiga kaj pozitiva sed estas problemo rilate la necesajn 25% de la propra enspezo rilate la grandan eŭropan projekton Lingvo.info. Temas pri nepreco ke EEU mem el propraj rimedoj kunfinancu la projekton kun 25.000 eŭroj (atentu, la sekretario erare informis en sia raporto por 2013 ke temas pri

80.000 eŭroj). Tiusence nepras intensivigo de varbado por helpdonacoj. Estas gravege ke la projekto sukcesu ĉiunivele, do ankaŭ finance.

La estaro decidis peti Loes Demendaal fari revizion de la financaj raportoj por 2013, kiun ŝi prezentos al la asembleo.

3. EEU-kongreso en 2016. La estraro jam en Galivo decidis ke ĝi okazu en Nitra en Slovakio. Petro informis, ke slovakoj invitis Universalan kongreson samjare en Nitra kaj ke ili planas samtempe kune organizi ambaŭ kongresojn, sed ĉu estos tiel dependos de tio ĉu UEA akceptos la kandidatiĝon de Nitra.
4. Oni diskutis pri eŭropa himno kaj decidis ke la prezidanto sendu la plendon al eŭropa ombudsmano pro malakcepto de nia propono pri popoliniciato rilate la himnon. Rilate la aperigon de KD kun eŭropa himno kantata en Esperanto kaj naciaj himnoj kantataj nacilingve oni petis Flory esplori la aŭtorrajtojn pri elektitaj kantoj.

5. Diversaĵoj: a) oni diskutis pri la ŝanĝo de la poŝta adrese de EEU kaj decidis anonci la oficialan adreson, tiun de Flory Witdoeck, b) pri Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) kaj decidis urĝe peti kunfinacadon de UEA kaj inviti necesajn gastprelegantojn kaj c) estis decidite prepari apartan informilon pri EEU en kelkaj lingvoj.

Petro Baláž

KARNAVALOJ KIEL POPULARA INFORMRIMEDO PRI ESPERANTO

Ĉi-jare dum la februar-marta karnavala periodo kiam en multegaj urboj oni okazigis karnavalojn estis almenaŭ du bonaj ekzemploj kiel eblas eluzi tiujn amase ŝatatajn spektaklojn por informadi pri Esperanto.

Unue la hispanaj esperantistoj surpriziĝis pri grupo de ili nekonata kiu prenis la nomon Esperanto kaj aktivis kiel muzikdanca grupo en pluraj karnavaloj reklamante nian lingvon antaŭ dekmiloj da spektantoj. Ankaŭ Esperanto-societo de nia ĉi-jara kongresurbo Rijeka organizis karnavalan grupon. Jen la raporto:

KOMPANIO «PAŽDROĆ» ĈE KARNAVALA PARADO EN RIJEKA



Ĉijare, la 2-an de marto 2014, jam la okan fojom laŭvice nia Esperanto-Maskerada Kompanio «Paždoć» partoprenis la internacian karnavalan paradon en Rijeka kiu estas unu el la plej konataj en Kroatio kaj la sudeŭropa regiono. Ĝi okazas kiel kutime ĉiu-jare meze de monato februaro aŭ komence de marto. En la karnavala parado de maskiĝintaj grupoj partoprenis 120 grupoj kaj

ĉirkaŭ 10.000 partoprenantoj. La parado daŭris pli ol 6 horojn kaj ĝin spektis pli ol 100 mil spektantoj. Per sia maskerada kompanio Esperanto-Societo el Rijeka prezentis sin al vasta publiko. Nomo de la grupo «Paždroć» en kroata ĉakava dialekto signifas en Esperanto proksimume «tohuvaĥabuo» (En la loka dialekto dela itala minoritato la vorto estas preskaŭ la sama «pasdrocio»). La kompanio ĉiujare elektas apartan nomon por prezenti sin en la karnavalo. Ĉi-foje estis elektita la nomo «majmuni» (simioj). Sur alegoria ĉaro estis prezentita granda banano. La kompanio en la karnavala parado konsistis el 30 maskitoj kaj havis alegorian veturilon. La nomo de la grupo «Esperanto Kompanio Paždroć» estis klare videbla sur banano super la veturila ĉaro. La grupo havis apartan sloganon: «De Kostrena ĝis Lovran ĉio estas la banan'». Alveno de la grupo estis menciata ĉe ĉiu el 5 kontrol-punktoj por la publiko per laŭta anonco «Jen alvenas Esperanto kompanio Paždroć kun sia banano». La citita anonco estis ankaŭ klare aŭdebla en televida elsendo de la karnavala parado ĉe Televido

«Kanal RI». Nia esperanta grupo estis bone prezentita ĉe la televido. La karnavala grupo konsistis el 7 esperantistoj, neesperantistoj kaj anoj de la loka itala minoritato. Ĉi-jare en la grupo estis ankaŭ usona duopo. Oni intencas plilarĝigi la grupon estonte kun alilandaj esperantistoj. Interesuloj kiuj volus kiel membroj de la karnavala grupo partopreni en la parado devas mem kovri kostojn por prepari la maskojn, kaj averaĝe tio kostas ĉirkaŭ 40 eŭrojn popersone. Ĉiuj interesuloj kiuj volus partepreni la paradon en 2015, ĉu kiel anoj de la karnavala grupo, aŭ kiel aparta karnavala grupo, aŭ kiel spektatantoj, kontaktu Esperanto-Societon Rijeka (esperanto.rijeka@ri.htnet.hr) kaj ili ricevos necesajn informojn. Poŝta adreso de Esperanto-Societo Rijeka estas: Blaža Polića 2, HR-51000 RIJEKA, Kroatio.

Vjekoslav Morankić

LA KULTURCENTRO KVINPETALO ORGANIZAS SERION DA ALTNIVELAJ STAĜOJ



La venonta serio okazos en Kvinpetalo (en Bouresse, okcidenta Francio) de la 14a ĝis la 18a de aprilo. Temos pri trejnado de instruistoj. Tiu staĝo taŭgas evidente por trejniĝi por efika instruado kaj ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo "Pedagogio" de la Atesto pri Kapableco de Franca Esperanto-Instituto. Katalin Kováts, redaktoro de edukado.net kaj profesia trejnisto de lingvo-instruistoj gvidos 5-tagan seminarion por instruistoj kaj instruemuloj. La programo konsistis el intensaj labortagoj, kun teoriaj kaj

praktikaj partoj, inklude ankaŭ antaŭseminariajn prepartaskojn kaj finseminarian provinstruadon de la kursanoj.

Pri detala plano de la staĝo kaj pri teknikaj detaloj, vidu la retejon de Kvinpetalo <http://www.kvinpetalo.org/>

Claude Nourmont

POLA INSTITUTO EN MADRIDO DEDIĈIS SPACON EN MARTO AL ZAMENHOF

La kalendaro eldonita de la Pola Instituto en Madrido, kun bildoj de famaj pollandanoj, dediĉis la monaton marto al d-ro Zamenhof, per afiŝo de la ekspozicio en la Centro Ludwik Zamenhof en Bjalistoko

<http://www.culturapolaca.es/#es.wydarzenia.687>

http://www.culturapolaca.es/images/Wydarzenia/art_znaczek_2.jpg

Ili sendis ekzempleron al la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio.

José Antonio del Barrio

EKSPOZICIO "ESPERANTO KAJ KOLEKTADO" INVITAS VIN PREZENTI KOLEKTITAĴOJN

La 27-an de septembro 2014 (kadre de la tutŝtata filetala ekspozicio) okazos ankaŭ inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio kun la supra temo en la Esperanto-Muzeo Svitavy en Ĉeĥio. Por ke ĝi estu laŭeble plej kvalita kaj bunta, organizantoj bonvenigus kunlaboron de Esperanto-kolektantoj!



Ni serĉas interesiĝantojn, kiuj pretus senpage disponigi por unu jaro elekton el siaj kolektoj. Bona pritrakto kaj protekto kontraŭ damaĝo aŭ ŝtelo estos prizorgita. Nomoj (kaj laŭ interkonsento fotoportretoj) de la ekspoziciantoj estos videble menciitaj. ĈEA pretas repagi sendokostojn de la pruntedonantoj kaj siakoste ankaŭ bonorde resendi la materialojn post fino de la ekspozicio.

Ni serĉas ekspoziciaĵojn en la sekvaj kategorioj:

1. **"Esperantaĵoj"** (prioritate filatelaĵoj: poŝtmarkoj kaj kovertoj, kaj tridimensiaj objektoj (suveniroj kun Esperanto-motivoj, kuriozaĵoj) sed ankaŭ insignoj, glumarkoj, medaloj, kalendaroj ktp (ne bildkartoj, krom historiaj ĝis 1939).
2. **"Kion kolektas esperantistoj"** - specimenoj el diverstemaj kolektaĵoj pri NEesperantaj temoj: ekz. moneroj kaj bankbiletoj, artaĵoj, popolmetiaj objektoj, folkloraj pupoj, ludiloj ĝenerale k.t.p.
3. **"Kuriozaj suveniroj el eksterlando"**

Bv. sendi vian ĝeneralan oferton al la adreso muzeagrupo@esperanto.cz (kun priskribo kaj laŭeble fotoj de la ekspoziciaĵoj). Nur post konkreta interkonsento bv. sendi la elektitajn objektojn. Alikaze ĈEA ne garantias kovron de sendokostoj aŭ ekspoziciigon. Eblas kompreneble ankaŭ persona transdono en Svitavy (aŭ dum Regiona renkontiĝo en Litomyšl).

Laŭ Retkomunikoj de ĈEA, 2014/01

PEKO (PRINTEMPA ESPERANTO-KUNVENO) 21-23.03.2014 EN BELGIO

La organizantoj de tiu ĉi kunveno estis Valère Doumont, estrarano pri eventoj ĉe APE (Asocio por Esperanto en Valonio), kaj Jean-Pol Sparenberg. Se Valère estis la *motoro* de la aranĝo, Jean-Pol zorgis pri la nepraj detaloj (kolekto de la kotizoj, disdono de la ĉambroj, kvanto-kalkulado de la manĝoj, ktp...).

La loko estas *Centre Protestant d'Amougies* apud Ronse (Renaix) en bieno de 6 hektaroj piede de Mont-de-l'Enclus, 70 km de Bruselo. La ĉefaj atutoj estas la arbaro en belega naturo kaj bonega kuiristo.



Ni venis el Bruselo, Valonio kaj Flandrio, sed ankaŭ el Nederlando, Germanio, Francio kaj Svedio. Tamen estis multe pli da naciecoj! Do vera Esperanto-semajnfino.

Sed apartan etoson ni ŝuldis al la junuloj de la *Verdaj Skoltoj*. Estis kiel ia nova freŝa aero dum tiuj 3 tagoj. Mi pensas ke Valère volis enkonduki siajn skoltojn en la Esperanto-Movadon kun multaj diversaj aspektoj kaj temoj. En tio li brile sukcesis. Estis tre diversa programo en kiu ĉiuj trovis sian intereson.

Unu el la plej interesaj estis la “Interkultura Seminario” far Kiki Tytgat. Ŝi montris la diversajn etiketojn laŭ landoj kaj avertis nin pri manieroj kiujn ni kutime faras en niaj landoj sed kiuj tute aliaj estas akceptitaj en aliaj landoj kaj kontinentoj! Ŝi tiel parolis pri la problemoj dum aranĝoj de “Pasporta Servo”.

André Demarque respondecis pri “Desegnado laŭ Van Gogh” kaj poste oni vidis belajn afiŝojn sur la kolonoj de la Centro. Vi povas imagi la fierecon de la desegnistoj! Nicky Janssen montris al ni kiel prezenti “Mazi en Gondolando” al tre junaj infanoj; sed ŝi estas vera aktorino kiu tiel ame kaj brakume ludis kun la etaj spektantoj. Kaj ŝi gvidis kuiratelireron kun Lode kaj Catherine por bonege kuiru la plantojn kiujn kelkaj partoprenantoj rikoltis. Fransuaz (Françoise Pellegrin) faris la paroligan kurson de Esperanto por multaj partoprenantoj. Denove mi devis miri pri ŝia nekutima maniero instrui la lingvon eĉ al progresantoj!

Tute ne atenditan enhavon proponis al ni Yves Nevelsteen en sia prelego pri “Fastado”. Jes ni nun estas en Karisma Tempo, sed tio ne estis la kerno de la prelego: “fastado” estas tre bona por la homa korpo! Kaj Yves konvikis nin per multaj bildoj kaj sciencaj eksperimentoj ke ni manĝas tro multe, tro ofte kaj erare! Mi sugestas al vi inviti lin por prelegi en via E-klubo! Lode Van de Velde kaj Catherine Samain iris al la naturo kun pluraj interesitoj por kolekti amason da herboj kaj diversaj floroj. Poste ili iris en la kuirejon de la Centro kaj el tiuj herboj kaj floroj preparis por ni ege bongustajn kukojn.



Valère Doumont prezentis al kelkaj siajn planojn rilate la verdajn skoltojn. Estas ambiciaj projektoj kiuj certe konkretiĝos pro la sindediĉo de Valère kaj la junuloj. Dum la vesperoj ni aŭdis Thierry Saladin pri AVAAZ-Internacia Peticio favore al Esperanto lanĉita per 16 jaraĝa knabo. Alia prezentado estis tiu de Pjotr De Mulder (verda skolto), kiu frandigis nin per tre bela klasika gitara koncerto. Kaj mi feliĉe povis montri la unuan parton de la filmo de la “Eŭropa Himno”, kantita far Ostenda Koruso en fama preĝejo de

Oostende.

Pli poste oni prezentis filmon pri la minejoj en Charleroi “Le Borinage”, filmon de ostendano Henri Storck en la franca kun subtitoloj de Nikolao De Buyl.

Alina Brückner gvidis ŝtofcolorigadon kaj poste prezentis kun Klara Ertl bildojn pri la aktivado de la Verdaj Skoltoj dum la lasta jaro. Mirinde!

Inter tiuj nombraj programeroj okazis ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de BEF (Belga Esperanto-Federacio).

Finfine Piet Glorieux majstre interpretis la promenadon tra Ronse (la flandra ĉiĉorino miris pri tio ke el lia traduko ŝi multon komprenis).

Kelkaj aliaj partoprenantoj promenis kaj aŭdis legendojn sub la gvido de Monique Van Roy. Sed la plej trafa afero estis ke ĉio iris tre glate kaj akurate.

Kial? Ĉar la Verdaj Skoltoj zorgis pri ĉio: aranĝoj de la salonoj, pretigo de la tabloj por la manĝoj, servo kaj elpreno post la manĝoj, zorgo pri trinkaĵoj, konstruo de podio, eĉ purigado, ktp, ktp. Vere ni estis kiel en tri-stela hotelo!

Nur unu frazo taŭgas: Dankegon al la verdaj skoltoj <http://verdajskoltoj.wordpress.com/> !

Flory Witdoeckt

LA PLEJ MALJUNA ESPERANTISTO EN EŬROPO 101-JARA EDUARDO LARROUY

Pri mia esperantista vivo

Kiam mi aĝis 19 jarojn, dum amika kunveno mi ekkonis la nomon Esperanto pro mia komento pri la tiama bezono de komuna lingvo por ĉiuj landoj, kiu permesus la interkompreniĝon. Tiam la vere internacia lingvo estis la franca, kiun mi konis pro familia deveno. Unu el miaj amikoj sciis pri la funkciado de la Grupo Esperantista de Bilbao, kiu fondiĝis la 20an de majo 1906, kaj ni ambaŭ decidis komenci la lernadon de Esperanto dum la kurso 1932/33.

Estis sep-monata kurso dum tri tagoj semajne po 1 horo, klarigata de Alberto Díaz Chapartegui, patro de Amador Díaz, kiu poste estis Komitatano de Britia Esperanto-Asocio, kaj mi atingis permeson sekvi dum pliaj tagoj specialan rapidan kurson por tri profesoroj de publikaj lernejoj, kiun gvidis Lingva Komitatano kaj grupfondinta vicprezidanto Victor Olegario Allende. Poste kun pli ol 25 grupanoj el Bilbao mi vojaĝis al Santander (Nordhispanio) por ĉeesti en aŭgusto 1933 la 10-an Hispanan Kongreson.

Bone oni rimarkas ke Esperanto kaptis min kaj mian amikon kaj tuj ni komprenis la valoron kiun Esperanto povus doni al la laboristoj, kiuj tiam pro granda senlaboreco devis vojaĝi eksterlanden kaj ni decidis proponi al la Kultura Fakto de nia Komiza Sindikato aldoni Esperanton inter la diversaj temoj, kiujn tie oni instruis.

Post aprobo de tiu propono ni aranĝis kurson en la jaroj 1934/35 kaj superan kurson 1935/36 kun 25 kaj 10 lernantoj respektive kaj ni decidis formi Grupon Esperantistan de Komiza Sindikato en Bilbao kaj tuj preparis ruĝan flagon kun verda stelo meze kaj nomon de nia laborista grupo, kiu defilis dum la ĝenerala manifestado de la 1-a de majo 1936 kunportante grandan afiŝon “Esperanto al la lernejoj” portata de 2 esperantistinoj kaj 2 knaboj, kiuj estis forte aplaŭdataj tra la tuta seskilometra trairado.



Kaj nun venas la eklipso. Komenciĝis hispana civila milito (1936/39), kaj mia amiko kun mi enmiksiĝis kontraŭ la ribelo de la militistoj. Ni perdis la militon, Saturnino Montero, mia amiko, perdis la vivon kaj mi la liberecon kaj la laborpostenon kaj krome ambaŭ esperantaj grupoj estis malformitaj. Nura grava escepto estis ke kun vera risko aliaj grupanoj kiuj ne batalis savis la tutan bibliotekan enhavon kiun posedis kaj ankoraŭ posedas nia “neŭtrala” grupo.

Kia estis la esperanta Movado en Bilbao, post la militfino ? Plena silento kaj eĉ timo, ĉar eble pro nescio nia kvinpinta stelo kiu ornamis nian grupan balkonon aperis ĉe la rubaĵo pro ordono de la ĉefulo kiu regis la taĉmenton, kiu okupis nian “neŭtralan” ejon.

Pri nia Sindikata loko restis nenio, nur fortaj persekutoj. Mi mem estis vundita dum la bataloj apud Santander (Nordhispanio) 24/8/1937 kaj tuj kaptita kaj enmetita en koncentrejan kampon. Trairinte plurajn diversajn kampojn mi eniris punbatalionon en kiu mi pasigis pli grandan parton de mia mallibereco laborante je reconstruo de detruitaj vilaĝoj, aŭ farante novajn ŝoseojn, kaj eĉ enterigante niajn mortintojn. Kiel kuriozaĵo mi povas rakonti ke iunokte en la koncentreja parto nur por malliberaj membroj de internaciaj batalionoj mi aŭdis paroli esperante kaj kiam mi demandis de kie ili alvenis, mi ricevis la respondon: el Bulgario kaj Germanio. Sed sekvis sur mia dorso tiel forta pafilbato, kio malhelpis min vidi ilin denove.

Feliĉe restis en Bilbao nia grupano Juan Muro Ríos, blindulo, kiu tiam estis biblioteka direktoro de la Surdmutula Lernejo kaj konsideris konvene instrui Esperanton al 5 junuloj, ankaŭ blinduloj, per Brajla alfabeto, kiuj tre facile ekregis la lingvon kaj ofte aliaj grupanoj iris tien por legi al ili la ĉiutagajn ĵurnalojn kaj esperantaj novaĵojn, kiujn oni ricevis el aliaj landoj. Eĉ sinjoro Teo Jung sendadis, je peto de nia grupo, dum 3 jaroj senpage Heroldon de Esperanto tuj post la dua modmilito, nur tial ke ni estis antaŭaj abonantoj. Tio estis oportuna helpo, kiun nia grupo dankis.

Mi revenis al mia patra hejmo la 11/9/40 kaj devis min prezenti ĉiun duan semajnon por kontrolo ĉe la plej proksima civilgardista kazerno kaj ĉiuj, kiuj iom post iom revenis el karceroj aŭ malliberejoj devis agi same kaj poste iri al la Biblioteko, ĉar ĝi situis ĉe centra placo kaj poste promeni, kvankam oni povis fari tion en maksimume tripersonaj grupoj. Nia grupano Juan Muro petis permeson al la Blindula Organizo, por kunvenigi kelkajn esperantistojn en apuda ĉambreto kaj kvankam ni ne ekzistis laŭleĝe, la propono estis akceptita sen oficiala permeso pro kleriga instruo kaj tiel ni povis komenci la laboron por kontakti kun la grupoj el Zaragoza kaj Valencia, kiuj jam atingis la leĝan rekonon.



Kaj la 18/10 1952 formiĝis provizora grupa estraro. Baldaŭ venis invito el Valencia, kiu julie aranĝis la 13an Hispanan Esperanto-Kongreson. Fine, la 3/5/1953 la Grupo Esperantista de Bilbao oficialiĝis denove kaj decidis prepari sin por organizi la 14-an Hispanan Kongreson en Bilbao inter la 7-a kaj la 10-a de aŭgusto 1953. Aliĝis 554 kaj inter ili estis 43 el aliaj landoj, kaj efektive ĉeestis pli ol 300 esperantistoj.

Kiel ĉefaj aranĝoj en Bilbao estis la 4-a Hispana Kongreso kiu okazis la 18/6/1924, poste la 14-a kongreso ĵus citita, kun eldono de Esperanta/Vaska ŝlosilo, kies aŭtoro estis la unua

prezidanto-fondinto de nia grupo, Teodoro Elizondo Calera. Sekvas la 27-a Hispana Kongreso kun inaŭguro de strato Esperanto en 1966 kaj poste la 53-a UK en Madrid en 1968, tiam en Bilbao realiĝis la 6-a Internacia Geografia Semajno, aranĝita kun Tibor Sekelj kaj kun partopreno de gesinjoroj Holmes, tiama prezidanto de UEA, kun vizitoj interalie al la Altamiraj Grottoj. En 1981 okazis la 75-jara jubileo de la fondiĝo de la Grupo kun Internacia Renkontiĝo kaj akcepto far la Urbestro de Bilbao por la Grupa Estraro. En februaro 1987 aperis la 1-a numero de la trimonata grupa bulteno “Nia Ponto” kun speciala vesto. En 1989 okazis la 49-a Hispana Kongreso kaj eldono far la Bizkaia Deputitaro de Turismo de broŝuro trilingva (vaska-eŭska/hispana kaj Esperanta).

En 1991/92 oni eldonis revuon priesperantan “Internacia Lingvo”, dulingva (hispane kaj eŭske), kaj en 1993/ soci-kulturan revuon pri Eŭskio, esperantlingve, “Eŭska Kverko”. En 2001 en la Eŭska Universitato, la unuaj fojonoj oficialiĝis instruado de Esperanto kaj kiel unu el la ĉefaj aranĝoj de nia grupo estis la organizo de la 6-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso inter la 25-29/8/2004 kun samtempa aranĝo de la 63-a Hispana Kongreso. Komprenu ke mi dediĉis mian eksterlaboran tempon por la organizo de nia grupo en ĉiuj fakoj, kiel estrarano, kasisto, sekretario kaj ankaŭ prezidanto, mi havas la numeron 6 kiam oni en 1953 leĝigis nian unikan tiaman Esperantan Grupon, kaj la numeron 44 kiel membro de Hispana Esperanto-Federacio, kiu formiĝis je 1/10/1948. Baldaŭ mi gvidis kursojn de Esperanto en nia grupo kaj kiam mi emeritiĝis post pli ol 40 laborjaroj, mi decidis daŭrigi la laboron. En 1979/80 mi organizis du kursojn po unu horo vespere kun partopreno de 8 virinoj kaj 2 viroj.



Specialaj eventoj

Kiel la plej grava evento, laŭ miaj sentoj sendube mi kredas la trakuradon de nia Esperanta ruĝa flago kun verda stelo tra la stratoj de Bilbao, kiun sekvis la panelo “Esperanto al la lernejoj” kaj tio estis forte aplaŭdata de la popolo, kiu preskaŭ sen konscio kaptis ke la interkompreniĝo internacia devas estis popola kaj ne elita. Poste, la etoso kaj normala dediĉo de ĉiuj membroj kiuj ĉeestis la ĉefan grupon, kelkaj ĉiutage eĉ kiam ne okazis kurso, kaj aliaj, du fojojn semajne, kun konversacio,

nur esperante, kiu por ni, junuloj, estis tre konvena, ĉar inter la ĉeestantoj estis du membroj de la Esperanta Lingva Komitato, kiuj ĉeestis en diversaj internaciaj kongresoj kaj gramatike nin korektis. Kaj jam post hispana milito alvenis multaj junuloj kun veraj deziroj lerni kaj profiti la lingvon kaj eĉ vojaĝi, kiam oni povis ricevi necesan oficialan permeson.

Mi ne partoprenis multajn internaciajn kongresojn pro financaj kialoj kaj la unua estis en Madrid (1968), ĉefurbo en nia lando, kiun tute mi ne povis ĝui, ĉar mi devis atendi alilandanojn kaj zorgi pri la tuj posta aranĝo: la 6a Semajno Geografia, kiu devus okazi en Bilbao kaj kiel delegito de nia Grupo mi devis kontakti kun Tibor Sekelj. Tamen poste dum la jaro 1970 en Vieno mi konstatis la oratorajn kvalitojn de Ivo Lapenna kun la firma valoro kiun donis al la Kongreso la prezidanto de Aŭstrio s-ro Franz Jonas, kiu plene esperante parolis kaj entuziasmigis la gekongresanojn. Post Stockholmo 1980, mi kongresis en Zagreb 2001, Goterbog 2003, Vilnius 2005, Firenze 2006, kaj Rôtterdam 2008, kiu preskaŭ certe estos la lasta. Dum 2002 mi ĉeestis la 5-an Eŭrop-Unian Kongreson en Verono ĉiam kun geamikoj el nia Bilbaoa Grupo.

Oficialigo de Esperanto

Dume venis diversaj oficialaj deklaroj, unue de Ligo de Nacioj kaj poste la rezolucioj de Unesko, (Montevideo 1954 kaj Sofia 1985) ĝis la aprobo en decembro 1992 de la Asembleo de Uniiĝintaj Nacioj, kiu konfirmis la petojn de nacioj kaj etnoj, kiuj uzas minoritatajn lingvojn esprimante la starpunkton ke la instruado de lingvoj sekvu jenan ordon: 1) Gepatra lingvo, 2) Regiona, se malsamas 3) nacia, se malsamas la du unuaj kaj 4) Internacia lingvo, kiel punta lingvo.

Ni, la esperantistoj, tra niaj kunvenoj, sen religiaj adoroj al Dr Zamenhof, entuziasme sekvas la konsilojn, kiujn li ofte klarigis al ni, ĉefe pri unueco kaj lingva evoluo laŭ la Akademio de Esperanto. Kaj speciale mi devas reliefigi ke krom la aprobo de la superaj Organizoj ĉiuj el ni, laŭ la Homrajta Ĉarto, povas utiligi propran lingvon, kiam kaj kie ajn, sen malhepoj, ĉar tiu lingvo, estas nia propraĵo, nepra heredaĵo, tute same kiel niaj fingraj-spuroj.

Tamen ĝis nun niajn naturajn rajtojn oni ne rekonas, ĉar la rezulto de la dua monda milito donis tre specialajn povojn al la kvin venkintoj en nova UNO, kiuj poste devis akcepti pliajn lingvojn: la araban la ĉinan kaj la germanan, por plene rajti la lingvan tradukon ĉe OUN, ŝanĝante la ĝistiaman francan regadon kaj donante pli grandan povon al la angla/usona duopo.

Kaj kio povus okazi se la financaj povoj, nun diktatore ordonante niajn vivkondiĉojn, dezirus ankaŭ regi super nia lernado kaj uzado de nova internacia lingvo?

Nuna situacio kaj eblaj taskoj

Ni estas simplaj civitanoj esperantistoj kun niaj asocioj internaciaj kaj naciaj, grupoj, kongresoj, ktp. kiuj uzas multe Esperanton tra la plej novaj teknikaj medioj, kiuj multe influas kaj devas influi por la disvastigo de Esperanto tra la tuta mondo kaj ni deziras helpi tiujn historiajn regionojn kun lingvaj minoritariaj, kiuj volas ricevi similan tradukon kiel aliaj lingvoj, plenumante la deklaron de Unuiĝintaj Nacioj, kaj tiu rajto nur eblas per lingvo kiu ne apartenas al iu nacio, kiel Esperanto. Kaj tio ne estas simpla, ĉar ni ankaŭ bezonas apogantojn grandnombre, ĉar ni perdis la popolan subtenon, ja ofte ni trovas personojn kiuj kredas ke Esperanto estas nomo de futbala teamo.

Krome, eble pro la teknikaj iloj nepre necesaj, kreskis la individueco, kaj la asocioj, kiaj ajn, perdis forton, ricevante ofte en grupoj junulojn kiuj deziras peti klarigojn pri Esperanto, sed ili konsideras pli komforta la lernadon tra interreto hejme kaj poste viziti de tempo al tempo la grupon.

Kiam foje mi ĉeestis debaton dum kiu oni tuŝis la ĉefan rolon de Esperanto kiel taŭga kaj funkcia lingvo, oni opiniis ke nia lingvo ne estas preparita por plenumi tiun rolon pro manko de instruistoj, metodoj, teknikaj vortaroj, ktp, sed ĉefe tial ke per ĝi nune oni ne povas gajni monon aŭ almenaŭ trovi laborpostenojn, eĉ ne internacie.

Nur tiu lasta punkto ĝenerale estas ĝusta kaj nature ni ne proponas nuligi la uzadon de tiuj lingvoj kiuj nun estas efikaj por la internaciaj rilatoj kiel la angla, franca, germana, ĉina aŭ rusa, sed ni devas pensi pri la estonteco kaj same kiel la tempo, aŭ aliaj historiaj potencoj, decidus la lingvan anstataŭon, ni devas labori efike por enkonduki la lernadon de Esperanto en lernejojn, kiu unue povus esti fakultativa por lernantoj inter 8 aŭ 12 jaroj, kun allogaj internaciaj vojaĝoj al proksima Esperanta renkontiĝo, se eble eksterlande, aŭ interŝanĝi restadojn.

Eduardo Larrouy

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de marto 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Jozefo Reinvart, Melita Cimerman, Petro Baláž, Vjekoslav Morankić, Claude Nourmont, José Antonio del Barrio, Flory Witdoeck, Komunikoj de ĈEA, Eduardo Larrouy

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

